JAZYK VŠESLOVANSKÝ A ESPERANTO.

Napsal *Jos. Krumphols.* — (Pokračování.)

V naší době docíleno sice, alespoň mezi učenci, že — jak praví Dr. Jireček, »Slovan Slovanu rozumí ne sice v mluvě (jak žádal Kollár), ale aspoň ve spisech; pokrok ten však pořád ještě nestačí, pokud Slovan nerozumí Slovanu i v rozhovoru. A k tomu by dopomohla jenom řeč, kterou by všichni Slované uznali a přijali za společnou a pospolitou.«

Která řeč by to však měla býti, o tom mínění se různí. Kdežto jedni naprosto pochybují o samé možnosti jazyka takového, druzí ji připouštějí alespoň v theorii, ne však ve skutečnosti, považujíce všechna nynější nářečí slovanská za nedostatečná k tomu úkolu, zatím co třetí žádají si proto jazyka nového, umělého, kdežto čtvrtí viděli by nejraději svou mateřštinu k tomu účelu povýšenu, kdež ne vyvolenu, a jiní ještě jinak.

Tak Dobrovský, zdá se, a s ním do jisté míry i Štúr a Dobrjanský pomýšleli asi na povýšení církevní slovanštiny za jazyk všeslovanský. »Ale staroslovanština«, praví dr. H. Jireček, »jest jazyk v sobě uzavřený, řekli bychom ztrnulý, kterémuž není souzeno, aby se vyvíjel dále po sférách kroměcírkevních.« Církevní slovanština již za doby Dobrovského byla jazykem polomrtvým, který prožil už svůj věk a jemuž nelze již se vyvíjeti a tedy žíti. Nestačila-li už v XVII. stol. latina k úkolu jazyka obecného, tím méně hodila by se zajisté dnes k úkolu podobnému církevní slovanština.

Většina interessentů — to je nesporno — pomýšlela a pomýšlí ovšem na přijetí některého z kmenových jazyků slovanských za společný jazyk všeslovanský.

Volba ovšem není souhlasná; kdežto jedni, zejména Rusové, Jihoslované a Slováci (Kuzmány, Hurban, Hodža a Štúr) vyslovili se pro ruštinu: obětujíce jí i jednotu s češ-

tinou v úmyslu přiblížiti se ruskému, jak za to měli, všeslovanskému jazyku, jiní, zejména Poláci a mnozí Čechové, zdrželi se tak choulostivého projevu, nebo vyslovili se přímo proti ruštině a pro — srbštinu, jako na př. Hattala a dr. H. Jireček r. 1908, a opět jiní, jako Charvát Križanič, Polák Linde, Slovák Herkel, Slovinec Majar-Zilský a nejnověji Čech prof. J. Hošek* rozhodli se patrně pro jazyk nový — umělý.

A tento způsob rozřešení otázky jazykového spojení zdá se být i samému L. N. Tolstému nejrozumnější a nejpraktičtější. Praví to tom (17. IV. 1894):

»Aby si lidé rozuměli, jest nezbytno: buď aby všechny jazyky splynuly v jeden ...., neb aby znalost jazyků dle potřeby se rozšířila ...., neb aby jeden jazyk za společný byl vyvolen ...., nebo posléz, aby všichni uměle utvořený a usnadněný jazyk přijali a se mu učili. Toť idea esperantistů. Zdá se mi, že tato myšlenka jest nejrozumnější a — což nejdůležitější — nejuskutečnitelnější.«

(Pokračování.)

INTERNACIAJ PAGOJ.

Speciale por *»Český Esperantista«* boheme verkis *JUDr. Jos. Bürger.*

(Daŭrigo.)

Primitiva kaj la plej simpla maniero pagi en fremdajn regnojn konsistas en tio, ke la ŝuldanto (debitoro) hejme, ĉe la monŝanĝisto, en banko aŭ borso, aĉetas la pagilojn de fremda monsistemo (monerojn, banknotojn, ŝtatnotojn) kaj sendas ilin al sia kreditoro; ĉar laŭ la nuna stato de leĝodonado pri valutoj de ĉiuj kulturaj ŝtatoj, oni ĉiam povas ŝanĝi la oron kontraŭ pagiloj de tiu aŭ alia ŝtato aŭ per presigo en la monpresejo aŭ per ŝanĝo kontraŭ banknotoj en bilbanko (kiu kompreneble same kiel la monpresejo dekalkulas la pagon por monpresado), oni uzante tiun ĉi manieron de internacia pagado sendas plej ofte oron laŭ la pezo ĉu en vergoj ĉu en moneroj de sia aŭ de alia ne-

*) Ignaz Hošek: „Grammatik der neuslavischen Sprache" (Einer Vermittlungssprache für die Slaven der österreichisch-ungarischen Monarchie). Kremsier 1907. Preis 2 K.

interesata ŝtato. Ekzemple, se iu en Praha devas pagi en Paris'on 3444 ½ fr., li tien sendas la sumon aŭ en la pagiloj de franka valuto, se li povis en Praha ricevi ilin, aŭ li sendos unu kilogramon da pura oro, ĉu en vergoj ĉu en dudekkronaj aŭ dudekmarkaj moneroj ktp., ĉar en Francujo oni povas kiam ajn en ŝtataj monpresejoj aŭ en franca banko ŝanĝi por unu kilogramo da pura oro 3444 ½ frankojn. Tiu ĉi maniero de egaligo de internaciaj pagoj kaŭzas al paganto la elspezojn por prizorgo de fremdaj pagiloj, respektive de oro, por transportpagoj kaj asekuro, por ŝanĝo de oro en fremdajn pagilojn (pago por monpreso) kaj kaŭzas al paganto la perdon de rentumoj dum la tempo, en kiu mono aŭ oro vojaĝas.

La samaj elspezoj renkontas la kreditoron, kiu volus per la maniero ĵus montrita enkasigi sian kretitaĵon pagotan en la fremdlando kaj laŭ la fremda valuto; ankaŭ li devas la fremdlandajn pagilojn, kiujn li recevas de la ŝuldanto, antaŭe ŝanĝi en oron, la oron sendigi al si kaj hejme ŝanĝi la oron en sialandajn pagilojn, ĉar tiuj ĉi estas lia ĉefa celo.

La elspezoj kaŭzitaj per sendo de oro estas ekzemple inter Wien kaj Berlin proksimume 0·5073%, Wien-London 0·554%, Wien-Paris 0·6488%. Oni povas facile kompreni, ke ĉe tia primitiva maniero de internacia pagado, se oni ne rigardas ĝian multekostecon, la plej grandega parto de oro senĉese vojaĝus, ke eĉ ne estus la ekonomiaj rilatoj de diversaj landoj tiel intensaj kiel ili estas nun, precipe pro malfacileco, eĉ neebleco de kompensado.

Alia kutima metodo ekvilibri internaciajn pagojn konsistas en reciproka dekalkulo de debetaĵoj kaj kreditaĵoj de du ŝtatoj pagotaj en fiksita momento, kaj en posta kompeso de la diferenco per sendo de oro. La rimedo por tio estas ĉiuj valoraj paperoj (kuponoj, ĉekoj, gajnintaj lotbiletoj ktp.), kiuj estas pagotaj en fremdaj lando kaj valuto aŭ tuj aŭ plej longe post kelkaj semajnoj; inter ili la plej gravaj estas kambioj, nome devisoj.

(Daŭrigo.)

ESPERANTISMO KAJ PACIFISMO.

(Fino.)

Pacifismo estas movado multe pli malnova ol esperantismo. La unua projekto de la internacia lingvo aperas ja

jam en 1629-a, sed esperanto kaj sekve ankaŭ esperantismo naskiĝis nur en 1887. Pacifismo kiel movado sociala naskiĝis jam en la komenco de la XIX jarcento; ĝin antaŭiras paciga penado de individuoj de ĉiuj kulturaj epokoj kaj nacioj, estanta preskaŭ egale malnova kiel la milito mem.

Pri alia apartaĵo de pacifisma kaj esperantisma movado skribis interesajn vortojn s-o Gaston Moch, fervora pacifisto kaj esperantisto, en Jarlibro de Pacifisto: Oni ne devas identigi ambaŭ movadojn; esperantismo kaj pacifismo povas sin reciproke helpadi, sed ili estu tute sendependaj unu de la ilia. Multaj esperantistoj, per influo de la humaneco, komprenas la idealon de pacifistoj. Per la plifaciligo de reciprokaj rilatoj de diversaj nacioj, per uzado de interkompreniĝa rimedo, plifortiĝas ŝancoj je paca forigo de internaciaj malpacoj; esperanto en sia esenco estas rimedo por internacia harmonio. Per voĉdonado de kelkaj universalaj kongresoj pacifistaj estis pruvite, ke pacifistoj akceptas principe la ideon pri la lingvo internacia.*)

Sed ne estas malpli certe, ke nun multaj esperantistoj ne estas pacifistoj. Esperanto povas esti eĉ la rimedo por prepari la militon. Kaj simile ekzistas pacifistoj, kiuj ne ankoraŭ estas esperantistoj: ili aŭ dubas pri la ĝenerala ideo de la lingvo internacia aŭ favoras kiun ajn alian sistemon.

La penadoj de esperantistoj kaj pacifistoj estas ofte nomataj de kontraŭuloj penoj antaŭtempaj, *utopioj*. Sed la tuta nuna civilizo estis antaŭ kelka tempo ankaŭ utopio, ĉar ĝi ne ekzistis. Kio hodiaŭ estas nomata utopio, tio morgaŭ efektiviĝas. Internacian helpan lingvon artefaritan oni efektive jam internacie uzas; tio estas fakto! Kaj ankaŭ pacifistoj efektivigis vicon da bonaj aferoj. Iliaj projektoj vigle konstruataj sur nuntempa nivelo de socia kaj kultura stato havas la plej bonajn ŝancojn je efektiviĝo estante neniel trofruaj, sed aktualaj.

Al la aŭtoro de tiu ĉi artikolo oni riproĉis, kial li kunigas pacifismon kun esperantismo. Unue, per esperanto la aŭtoro estis varbita por la ideoj pacifismaj, esperanton li uzas, se li bezonas gajni sciigojn pri pacifismo el aliaj landoj,

*) En la XVI universala kongreso de paco estis akceptitaj gravaj proponoj, koncernantaj esperanton. Esperanto estas jam kongresa lingvo agada. Rim. de l' verkinto.

esperanton li uzas, se li ion anoncas pri pacifismo en fremdlandon. Sed por li esperanto estas ankaŭ necesa harmonia tutigo de la internacia vivo samtempe naskiĝanta, al kies organizado ĝi plej bone povas servi. Tiu ĉi neŭtrala, facile ellernebla lingvo estas kaj restos la plej taŭga lingvo por internaciaj kongresoj kaj por la plej diversaj internaciaj institucioj. Se la aŭtoro de tiu ĉi artikolo posedus rajton decidi pri la disdono de la paca premio de Nobel, li donus ĝin unuavice al la genia kreinto de esperanto, al dro Zamenhof, kiu metis per esperanto firman bazon de socia stato paca.

Esperantistoj kaj pacifistoj estas fratoj kaj al ili apartenas la mondo!

Zdislavice-Humpolec, 12. XII. 08. *Heřman Alferi.*

IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis *Jos. Krumpholc.*

(4. daŭrigo.)

Sekve oni vidas, ke, kvankam *Comenius* estis el la unuaj, kiuj protektis kaj defendis la rajton de la lingvo gepatra, kvankam senfina estis lia amo al liaj nacio kaj lingvo, tamen lia animo sopiris kaj penadis ankaŭ je ideo pri unu lingvo universala en la espero, ke per ĝi ebliĝos kaj efektiviĝos fine la disvastiĝo de civilizo kaj repaciĝo de la nacioj kaj gentoj kaj sekve ankaŭ la pliboniĝo de la tuta mondo . . .

Tial *la celo de la lingvo universala,* laŭ *Comenius,* estis, serĉi kaj rektigi la vojojn de unu nacio al la alia, esti la rimedo, kiel ĉiujn instrui pri ĉio necesa, kaj tiel zorgi egale pri ĉiuj homoj, do ankaŭ pri popoloj necivilizitaj, ke ĉiuj homoj per la sama helpilo komprenu unu la alian pli bone, kaj ke la saĝeco pli forte kaj certe estu konservita por la idaro, kaj ke kiu ajn kaj kien ajn povu vojaĝi sur la tuta terglob povante interkompreniĝi kun ĉiuj kaj ĉiu kun li.

Comenius volis, ke la lingvo universala estu la kunigilo komuna por homoj ĉiuj kaj ĉie, ne sole por instruituloj, sed ankaŭ por neinstruituloj, ke ĝi estu ia verŝilo de saĝeco kaj

kuracilo klariganta la spiriton, kaj tiel ia universala kontraŭveneno kontraŭ la konfuzo de ideoj.

Comenius deziris ankaŭ, ke la lingvo universala malpligrandigu la perdojn de tempo kaj objektoj, ke ĝi faciligu kompreni la substancon de objektoj kaj estu rimedo por klarigi la saĝecon de Dio per nova maniero, rimedo por reordigi la disiĝitan societon de nacioj, redoni al la mondo unu buŝon kaj tiel la gloron de Dio per glora maniero florigi.

Laŭ la notizoj en »Panaŭgia« la celo de »Panglottia«, sekve ankaŭ de la lingvo universala, estis fine, disvastigadi inter ĉiuj nacioj, generacioj kaj lingvoj sur la tero la lumon kaj civilizon kaj per tio forigi la kruelecon de nacioj kaj la malutilan kaj abomenan malkompreneblecon reciprokan (ἀφωνία), por ke la nacioj ĉesu sin mem ne koni, sin mem timi, malami kaj ignori, kaj ke estu forigitaj la obstakloj de homaj interrilatoj kaj ebligita la »panorthosia«, t. e. la universala plibonigo . . . (Daŭrigo.)

LA UNUA IDEALO.

De *J. Arbes.*

Jam multaj jaroj pasis de tiu tempo — bedaŭrinde, pli multe ol tridek . . .

Kvin semajnojn dum la libertempo mi pasigis vagante tra Bohemujo. Mi vagis piedirante de komunumo al komunumo, de urbo al urbo — jen sur ŝtata ŝoseo, jen sur kampaj vojoj kaj tuj denove sur vojetoj — jen tra kamparo, jen tra arbaro — laŭlonge de riveroj aŭ riveretoj . . .

Kaj ĉion ĉi mi faris preskaŭ sencele.

Pelis min ia neklarigebla maltrankvilo, kiu subite min kaptis. Mi sopiris ion nekonatan, nekompreneblan . . .

Oni ankaŭ ne miru pro tio!

En la dekoka jaro preskaŭ ĉiu el ni estas pli ofte, ol tio respondas al lia karaktero — melankolia. Sentoplena revado kaj delikata, ofte tute senobjekta sopiro ekscitas la animon. Ni sopiras ian »dolĉan sekreton« kaj iom post iom ĝermas en niaj animoj idealo de l'estaĵo, al kies piedoj ni alportus ĉion, kies unu sola rigardo nin feliĉigus kaj ĉarmus, kies spiro nin narkotizus.

Kaj tio okazis ankaŭ al mi.

Antaŭ mia spirita rigardo leviĝadis en la momentoj de l'izoleco etera estaĵo de dolĉaj revoj: libele gracia knabino kun pala vangeto, brula nigra okulo, korvonigra hararo kaj kun sentoplena, melankolie dolora mieno de l'antike simetria vizaĝo.

Unu sola rigardo, unu sola vorto, unu sola premo de l'mano sufiĉus por trankviligi la brulan sopiron . . . Sed kien ajn mi alvenis, kie ajn mi havis okazon renkonti knabinojn, nenie mi trovis la eteran imagon de miaj revoj.

Mi memoras, ke dum la sunplenaj tagoj someraj, precipe dum la revemaj lunaj vesperoj kaj noktoj ekscitadis min en la momentoj de l' izoleco ia dolĉe turmenta sopiro, ĝis poste iam kvazaŭ subite ŝanĝiĝis mia spirita stato.

Malvarma venteto ekblovis trans la stoplo, dum la nokto kovriĝis la firmamento de unutone griza nubo — kaj mian animon okupis neesprimebla dezerteco.

Antaŭe tiel alloga sencela vagado subite malplaĉis al mi. »Hejmen — hejmen!« bruis al mi la demono de malbonhumoro en la animon, kaj mi obeis. (Fino.)

LA BELULINO KAJ LA BESTO.

Malnova franca fabelo de s-ino Leprince de Beaumont.

(Daŭrigo.)

Neĝis terure; la vento estis tiel forta, ke ĝi lin dufoje deĵetis teren de lia ĉevalo; kaj kiam noktiĝis, li ekpensis, ke li mortos pro malsato aŭ malvarmo, se li ne estos manĝegita de la lupoj, kies blekadon li aŭdas ĉirkaŭ si.

Subite, alrigardante la ekstremaĵon de longa aleo, li vidis grandan lumon, kiu ŝajnis tre malproksima; tien li sin direktis kaj vidis, ke la lumo eliĝas el granda palaco tute iluminita. La komercisto dankis Dion pro la helpo, kiun li sendas, kaj rapidis al la kastelo. Sed li tre surpriziĝis, trovante neniun sur la kortoj; lia ĉevalo, kiu lin sekvis, vidante grandan malfermitan stalon, eniris internen, kaj, ĉar ĝi tie trovis fojnon kaj avenon, la kompatinda besto, kiu estis mortanta pro malsato, avide sin ĵetis al la manĝujo; la komercisto ĝin ligis en la stalo kaj ekmarŝis al la domo, kie li renkontis neniun; sed enirinte en vastan ĉambregon, li tie trovis bonan

fajron kaj tablon superŝutitan per viandoj, sur kiu vidiĝis sole unu manĝilaro. Ĉar la pluvo kaj la neĝo estis lin trapenetrintaj ĝis la ostoj, li proksimiĝis al la fajro por sekiĝi, dirante al si mem: »La dommastro aŭ liaj servistoj pardonos al mi mian maltimon, kaj sendube ili venos baldaŭ.«

Tre longe li atendis; sed vidante neniun, kvankam jam sonoris la dekunua, li ne povis kontraŭbatali la malsaton kaj ekprenis kokidon, kiun tremante li formanĝis en du glutoj; li trinkis ankaŭ kelkajn plengorĝojn da vino, kaj fariĝinte pli kuraĝa, li eliris el la salono kaj trairis multajn grandajn apartamentojn riĉege meblitajn. Fine li trovis ĉambron, en kiu staris bona lito; ĉar jam pasis noktomezo kaj ĉar li estis tre laca, li decidis ŝlosi la pordon kaj kuŝiĝi.

Estis la deka matene, kiam li morgaŭ vekiĝis, kaj li tre surpriziĝis trovante veston tre puran anstataŭ sia eluzitaĵo. »Certe — li diris al si mem — ĉi tiu palaco apartenas al ia bonkora feino, kiu kompatis mian situacion.« Li rigardis el la fenestro kaj vidis ne plu neĝon, sed bedojn el floroj, kiuj ĉarmis la okulojn. Li reeniris la ĉambregon, kie li hieraŭ vespermanĝis, kaj li vidis malgrandan tablon kun ĉokolado: »mi vin dankas, Sinjorino Feino, — diris li laŭte — ke vi havis la bonecon zorgi pri mia matenmanĝo!« La bonulo, trinkinte la ĉokoladon, eliris por serĉi sian ĉevalon kaj, trapasante laŭbon el rozoj, li memoris la peton de la Belulino kaj forŝiris unu multfloran branĉon. Samtempe li aŭdis grandan bruon kaj vidis alproksimiĝantan Beston tiel malbelegan, ke apenaŭ li ne svenis. »Ho! Vi, sendankulo! — diris la Besto terurvoĉe — mi savis al vi la vivon, vin akceptante en mia kastelo, kaj por danko, vi forŝtelas de mi miajn rozojn, kiujn mi amas pli ol ĉion ajn en la mondo! Vi devas morti por pagi tian kulpon! Mi donas al vi sole kvaronhoron por peti pardonon de Dio.«

La negocisto sin ĵetis sur la genuojn kaj kunplektante la manojn, diris al la Besto: »Via Moŝto, pardonu! Mi ne intencis vin ofendi kolektante rozon por unu el miaj filinoj, kiu ĝin petis de mi.«

— »Mia nomo ne estas Moŝto, sed Besto, — respondis la monstro — mi malŝatas la komplimentojn; mi volas, ke oni diru, kion oni pensas. Nu, ne kredu, ke vi min tuŝos per viaj flataĵoj. Sed vi diris al mi, ke vi havas filinojn: mi do bonvolas pardoni al vi, kondiĉe, ke unu el viaj filinoj

memvole venos, anstataŭ vi, sin oferi al la morto. Ne rezonadu; foriru; kaj se viaj filinoj rifuzos morti por vi, ĵuru, ke vi revenos post tri monatoj.« La bonulo kompreneble neniel intencis oferi unu el siaj filinoj al tiu malbelega monstro; sed li pensis: »Almenaŭ mi havas la plezuron ilin kisi unu lastan fojon.»

Li do ĵurpromesis, ke li revenos kaj la Besto diris al li, ke, kiam plaĉos al li, li povos foriri. »Sed — ĝi aldonis — mi ne volas, ke vi foriru kun la manoj malplenaj. Reiru en la ĉambron, en kiu vi dormis. Vi tie trovas grandan malplenan keston. Vi povas meti en ĝin ĉion, kio plaĉos al vi; mi ĝin portigos en vian domon.«

Samtampe la Besto malaperis, kaj la bonulo diris al si mem: »Se mi devas morti, mi havas la konsolon, ke mi postlasos panon al miaj malfeliĉaj infanoj.«

Li reiris al la ĉambro, kie li estis dorminta, kaj tie trovinte amason da ormoneroj, li plenigis la grandan keston kiun la Besto priparolis, kaj repreninte sian ĉevalon el la stalo, li eliris el tiu palaco tiel malĝoja, kiel ĝoja li estis, ĝin enirante. (Daŭrigo.)

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Kiu estis Comenius? *Jan Amos Komenský* (Johannes Amos Comenius, 1592—1670) estis »viro, kiu prezentas noblan kunigon de klasika kaj reala klero kun la vera kristana pieco; viro, al kiu ĉiuj kulturaj nacioj de la nova kaj malnova mondo rigardas kun la plej granda respekto, vidante en li grandan reforminton de edukado, fondinton de popola lernejaro, konstruinton de popola klerigado; viro, kiu prave estis nomita instruisto de la nacioj, ĉar li efikis ne sole per siaj verkoj, sed eĉ persone inter Bohemoj, Poloj, Germanoj, Angloj, Svedoj, Magiaroj, Holandoj, kaj estis amikiĝinta kun la plej eminentaj spiritoj de tiamaj Italujo kaj Francujo; viro, kiu per siaj verkoj havis efikan influon en Ameriko same kiel en Azio; viro, kies verkoj estis en lia epoko tradukataj en ĉefajn lingvojn eŭropajn kaj aziajn; viro, kiun konis unuarangaj ŝtatuloj samtempaj, kiun la angla parlamento kaj sveda kanceliero invitis, ke li reformu la lernejaron, viro, kiu laŭdire ankaŭ ricevis el Ameriko la honoran inviton akcepti la direktadon de kolegio de Harvard; bohema homo de signifo tutmonda, tuthomara, ,laŭ naskiĝo Moraviano, laŭ lingvo Bohemo, laŭ profesio teologo', kiel li mem nomis sin« (Prof. Dr. Drtina), viro, kiu estas unu el la plej unuaj, el la plej grandaj kaj entuziasmaj propagandintoj de la ideo pri la lingvo universala, viro meritanta pro siaj noblaj penadoj kulturaj, humanecaj, precipe pansofiaj, pacifismaj kaj internacilingvaj la estimon de la tuta esperantistaro. Kiel li, homo de XVII jarcento, estis proksima al ni, montras

la artikolo de s-o Krumpholc »Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala«. *Bšk.*

Komuna kongreso de bohemaj partianoj de esperanto, pacifismo kaj libera penso, kiu okazos en Praha dum la venonta Pasko, daŭros tri tagojn (10.—12. IV. 09). Ĝi konsistos el tri manifestadaj (ĝeneralaj) kunsidoj kaj el la kunsidoj de sekcioj kaj komisioj. Krom tio estos aranĝita granda ekspozicio kaj vespera amuzaĵo (12. IV.). Samtempe okazos ankaŭ societaj kunvenoj (ekz. komitata kaj membra kunvenoj de *Bohema asocio esperantista*). Speciale por esperantistoj estos aranĝita esperanta kunveno, en kiu oni diskutos esperante, kaj ekzamenoj de ekzamenaj komisioj de »B. asocio esp.« La temoj de paroladoj en la ĝeneralaj (manifestadaj) kunsidoj estas: *Ia kunsido* (Libera penso): La evolucio de la libera penso dum la lastaj jaroj, Libera penso kaj la plej novaj tendencoj religiaj, Libera penso kaj la evolucio de la socio; *IIa kunsido* (Esperanto): Neŭtraleco de esperanto (Dro Kamaryt), Patriotismo kaj esperanto (H. K. Bouška), Esperanto kaj libera penso (Dro A. Batěk), Esperanto kaj pacifismo (H. Alferi); *IIIa kunsido* (Pacifismo): Historio de pacifismo, Nuntempa stato de pacifismo, Propagando de pacifismo, Propono pri la organizo por defendado de tuthomaraj interesoj. Same la komuna ekspozicio konsistos el tri sekcioj apartigitaj (la sendaĵojn por esperanta sekcio oni adresu al la redakcio de »Bohema esperantisto«, Praha-III, Kampa 495, Bohemujo). La prepara komitato, konsistanta el membroj de *Bohema asocio esperantista* (Biskup, Bouška, Dr. Kamaryt), *Pacifista sekcio de »Jednota Komenského«* (Alferi, Klečka) kaj *Bohema sekcio de »Libera penso«* (Novák, Nováková, Myslík) sincere invitas ĉiujn samideanojn bohemajn, ke ili grandnombre partoprenu en tiu ĉi festo, ĝi ankaŭ kore invitas la fremdajn samideanojn, kiuj povus kaj volus veturi dum Pasko en Praha'n, ke ili estu niaj gastoj (Oni skribu al ĝenerala sekr. de »B. A. E.« Dro Kamaryt, Praha VI., Boh.). Ĉiu estos bonvenanta kaj mi esperas, ke venos multegaj samideanoj por manifesti nian komunan ideon. *H. K. Bouška.*

Esperantista movado inter Bohemoj (Kroniko.). Post la nova jaro renoviĝas la propagando en la bohemaj landoj kun kutima energio, sed ĝi jam ne atingas tian staton, kiel en la sezono inter la libertempo kaj Kristnasko. La rimarkinda fakto de nova sezono estas, ke »Bohema societo esperantista en Praha« la unuan fojon ricevis la permeson fari siajn publikajn kursojn en ĉambroj de la bohema universitato. La kursoj en Praha — nun estas farataj 7 kursoj (antaŭ Kristnasko 12) — estas multenombre vizitataj. Novaj kursoj komencis ankaŭ en Mělník, Mn. Hradiště, Ml. Boleslav, Plzeň k. a. Parolante pri la kursoj, mi devas ankaŭ konstati, ke en moravia ĉefurbo oni jam instruas ankaŭ ildon (»Unua publika kurso pri esperanto reformita komencis la 15an de januaro t. j. en komerca lernejo de Získal en Brno« diras la sciigo). »Bohema asocio esperantista« faras fervorajn preparojn por la *festa tago de bohemaj esperantistoj* okazonta la 11an de aprilo t. j. Tiun tagon estos granda manifestada kunveno de bohema esperantistaro (je la 10a antaŭtagmeze, interesa esperanta kunveno (vespere), kunsidoj sekciaj kaj komisiaj (posttagmeze), ĝenerala kunveno de »Bohema asocio esperantista«, ekzamenoj pri esperanto ktp. Kompreneble ne mankos la ekspozicio kaj amuza vespereto. Tiu ĉi unua kongreso de bohemaj esperantistoj estos parto de komuna kongreso esperantista, paci-

fista kaj liberpensula, kiu estos granda kaj grava manifestado de progresemaj ideoj tutmondaj. *H. K. Bouška.*

Bohemaj organizaĵoj esperantistaj en Praha (Klarigo petata de multaj samideanoj). En Praha ekzistas du ĉefaj lokaj societoj esperantistaj: *Esperantista klubo* (EK) kaj *Bohema societo esperantista* (BSE). Speciala societo ekzistas por virinoj: *Unua virina bohema grupo esperantista* (VGE). En Praha estas sidejo de du regnaj unuiĝoj: *Bohema Unio esperantista* (BUE) kaj *Bohema asocio esperantista* (BAE), al kiuj aliĝas *Ligo de bohemaj esperantistoj* (LBE), kiu uzas ankaŭ la nomon »Boh. asocio esp.« Krom tiuj ĉi ĉefaj societoj oficiale aprobitaj ekzistas en Praha *Studenta rondeto esperantista* (SRE) kaj *Esperantista sekcio de la klubo »Moravská Beseda«.* (SMB). En Praha estas sidejo de du bohem-esperantaj gazetoj *Časopis Čes. esp.* (ČČE) kaj *Český esperantista* (ČE). — (Daŭrigo.) *Bšk.*

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Světový esperantský svaz lékařů (Tutmonda esperanta kuracista asocio), ustavený v srpnu 1908, vytkl si za účel pěstovati esperantem praktické styky mezi lékaři různých zemí, usnadniti jim sprostředkování zpráv z ciziny, pobyt v cizích zemích a pod. Každý člen, jímž může býti každý lékař, platí ročně 2 Sm. (K 4·80), začež dostává spolkový orgán, měsíčník *»Voĉo de kuracistoj«* (Lwów, ul. Śniadeckich, 6; ročně 1·50 Sm = 3·60 K), který přináší články o organisaci, hmotných i mravních zájmech lékařů, články z mediciny sociální, referáty z lékařských časopisů, zprávy o esp. hnutí mezi lékaři, sdělení asociace T. E. K. A. a j. Svaz řídí pětičlenný ústřední výbor (volený každoročně v prosinci), který v každé zemi ustanovuje jednoho neb více konsulů, kteří řídí činnost ve své zemi a případně v různých městech a léčebných místech volí místní zástupce. V letošním výboru zasedají: professor Dor z Lyonu (předseda), dr. Mybs z Altony, dr. Whitaker z Liverpoolu (místopředsedové), dr. Róbin z Varšavy (jednatel) a professor Soulier z Lyonu (pokladník). Konsulem pro Rakousko je dr. Skalkowki. Při svazu založena je studentská sekce pro posluchače mediciny, kteří jsou přijímáni za členy za týchž podmínek jako lékaři. Veškeré zprávy a přihlášky lékařů přijímá Dr. W. Róbin, Senatorska 80, Warszawa, Rusko, přihlášky studentů Dr. Roblot, Charenton (Seine), Francie. *Hbk.*

Saský ústav pro esperanto v Drážďanech (Sächsisches Esperanto-Institut zu Dresden, Saksa Esperanto-Instituto en Dresden) jest ústav pro vyučování esperanta a pořádání zkoušek z esperanta. Ústav je schválen sas. ministerstvem vnitra (12. XII. 08) a podléhá jeho dozoru. V čele ústavu jsou vynikající hodnostáři drážďanští, ředitelem je dr. A. Schramm. Ústav pořádá kursy pro začátečníky i pokročilé, každý o 30 hod. (15×2). Za celý kurs účastníci platí 5 M, učitel dostává 120 M honoráře. Účastníkům kursu pro pokročilé, kteří vykonali zkoušku před ustanovenou komisí, vydává ústav zdarma vysvědčení o znalosti esperanta (neúčastníci platí zkuš. taxu 10 M). Zvláštní zkoušky pořádají se pro ty, kdož chtějí nabýti vysvědčení o schopnosti k vyučování esperanta. Ústav zřídil velikou veřejnou knihovnu esperantských publikací, které může používati každý

esperantista z Německa. — Činnost svou započal ústav velmi úspěšně: pořádá 31 kursů, jichž účastní se 1322 osoby. Bibliotheka čítá přes 1000 svazků. *Hmd.*

Vyučování esperantu na školách zavádí se již v mnoha zemích. V Anglii na příklad je vyučování esperanta zavedeno oficielně na 40 školách, zejména na mnoha školách a ústavech v Londýně. Také na 9 polských školách ve Varšavě, Krakově, Lvově a j. zavedeno je vyučování esperanta. V Bordeaux, kde koná se 12 kursů esp., vyučuje se esp. na jedné škole jako povinnému předmětu. V Odense v Dánsku vyučování esp. je ve vyučovacím programu vyšší obchodní školy. Také v Kolíně n. R. je kurs esp. na obchodní akademii. V Havru na obchodní a průmyslové škole dívčí účastní se vyučování esp. 36 žákyň. Ve vévodství Koburg-Gotha výnosem ministerstva bylo dovoleno nepovinné vyučování esp. na obchodních reálkách (v obchodních třídách reálních škol). *Hkb.*

Esperanto mezi policisty získává pozoruhodně půdu. V několika městech (Paříž, Drážďany, Štockholm, Kodaň) existují esp. kluby policistů, v mnoha městech (Paříž, Drážďany, Barcelona, Budapešť a j.) konají se zvláštní kursy pro policisty, a je dosti měst, kde policisté užívají esp. V Drážďanech má »Policista grupo Dresdena« přes 130 členů, v Paříži úředně schválený »Polica klubo esperantista« má čestným předs. pol. řid. a čest. členy chefy jednotlivých oddělení. Kurs esp. pro policisty v Barceloně navštěvuje 20 osob. Vídeňské policejní ředitelství upozornilo policejní úředníky na důležitost esperanta a mnozí z nich si je také osvojili. *Hkb.*

Esperanto na mezinárodních sjezdech. — *Mezinárodní federace dentistů* přijala (na sjezdu v Bruselu) esperanto za oficielní jazyk letošního kongresu v Berlíně. — *VIII. mezinárodní kongres hydrologie, klimatologie, geologie a fysikální therapie* (4.—10. dubna 1909) v Alžíru přijal také užívání esp.; sekretariát kongresový (Dr. L. Raynaud, place de la République 7, Alger) vydal již esp. program a esp. také korresponduje. *Hkb.*

Vzrůst esperantského časopisectva v posledním šestiletí ukazuje tento přehled:

koncem roku	1903	1904	1905	1906	1907	1908	
vycházelo esp. čas. . .	19	22	27	29	44	76	*G. E.*

České přednášky o esperantu. — V Litomyšli Spolek paní a dívek s Besedou uspořádaly (29. I. 09) přednášku o esperantu v malém sále Smetanova domu; přednášel p. farář K. Kučera z Mikulče. — V N. Bydžově (27. XII. 08), v Č. Bělé (2. I. 09) a v Hradci Králové (10. I. 09) mluvil (dle »Č. Č. E.«, přímých zpráv jsme nedostali) p. Procházka. *Kronikář.*

Veřejné kursy esperanta pro Čechy. — V Praze »Čes. společnost esp.« zahájila 19. I. 09 nové veřejné kursy esp. v budově české university, v posluchárně (č. II.) právnické fakulty v Carolinu (Ovocný trh); kursy, prvé konané v budově naší jediné Alma Mater, konají se v úterý a v pátek večer, pro začátečníky od půl 7. do půl 8. hod. (p. Barvíř), pro pokročilé od půl 8. do půl 9. hod. (p. dr. Kamaryt). Esp. odbor klubu »Moravská beseda« zahájil (20. I. 09) kurs pro pokročilé, vedený pp. Bouškou a Rieglem ve středu večer (8—9) v kavárně »Riviera«, Riegrovo nábřeží. Kurs pro vysokoškolské studenty pořádá p. Lustig v neděli dopol. (10—11) v posluchárně prof. Vejdovského. — Na Mělníce čilý odbor

»Československé obchodnické besedy« pořádá kurs, do něhož přihlásilo se 70 účastníků z města i okolí (další přihlášky nemohly býti přijaty pro nedostatek místa); kurs, zahájený 4. II. 09, koná se ve čtvrtek večer (8—10) v budově měšťanské školy a potrvá 2 měsíce; na žádost pořadatelstva »Svaz čes. esp.« pověřil vyučováním p. H. K. Boušku ze Smíchova. — V Mnichově Hradišti místní odbor »Č. O. B.« pořádá 2měsíční kurs, k němuž přihlásilo se přes 30 účastníků (poplatek 3 K); z ochoty vyučuje p. V. Pavlišta, učitel měšťanských škol. — V Ml. Boleslavě zahájen byl 13. I. 09 třetí (12hodinový) kurs esp., vedený p. Mouchou; vyučuje se ve středu večer (7—8) v II. tř. měšťanské školy chlapecké (zápisné 2 K). — V Plzni místní klub pořádá (od 12. I. 09) nový kurs pro začátečníky (poplatek 2 K) a konversační kroužky pro pokročilé. *Kronikář.*

Spolek německých esperantistů v Praze ustavil se pod názvem »Esperanto-Verein Verda Stelo Prag.« Ustavující valná hromada konala se 26. I. 1909 v kavárně »Edison« za předsednictví p. J. Boschana a za účasti asi 50 členů a hostů. Předsedou spolku zvolen prof. dr. Lederer, jednatelem p. J. Boschan. »Svaz českých esperantistů« na pozvání súčastnil se valné schůze dvoučlennou deputací (Bouška, dr. Kamaryt), která tlumočila předsednictvu projev sympathií, pozdrav a blahopřání svazu. Unionisté súčastnili se výpravou devíti (!) mužů, z nichž pan Hradil pěkně přednesl pozdrav »Unie čes. esperantistů« (teď snad vlasteneckou redakci z Dittrichovy ulice přejdou rozpaky, zda a jak má referovati o esp. hnutí mezi pražskými Němci). Spolek koná své schůze v úterý večer v kavárně »Edison« (Příkopy). Novému spolku přejeme plný zdar! *Bšk.*

Rozmanitosti. — V Anglii londýnská obchodní komora, oxfordská universita a národní svaz učitelů pořádají zkoušky z esp. — V Polsku je 14 esperantských spolků s 2000 členy. — V Edinburce (Angl.) koná se týdně 14 kursů esp. — Arabskou učebnici esp. (Kitab usul el Lurati l'gamiat Esperanto) s cvičebnicí a slovníkem napsal Gabr. Haddad (Libano, Sirio). — Esp. spolek v Le Puy dostává od města subvenci 100 fr. *Jtkh.*

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Kristana esperanta kantaro. 11 kantoj kun melodionotoj. Eldonis *P. Hübner*, red. de »Dia Regno«, Mühlheim a. R., Friedrich-Wilhelmstrasse 66, Germanujo. Prezo 25 sd. (Pĝ. 18) - La kantlibro enhavas tradukojn de 11 religiaj kantoj esperantigitaj de 8 diversaj aŭtoroj. La tekstoj estas akompanataj sole per notoj de melodioj, sed la oferema eldoninto promesas prizorgi la kvarvoĉajn notojn al ĉiu, kiu tion petos de li. *Rd.*

IV. internationaler Esperanto-Kongress. Bericht herausgegeben vom *Sächsischen Esperanto-Institut Dresden*. 1908. Prezo 1 Mk. (pĝ. 80). — Tiu ĉi eleganta, bele presita, riĉe ilustrita kaj lerte redaktita germana raporto enhavas 19 ĉapitrojn pri la Dresden'a kongreso, regularon de »Saksa Esperanto-Instituto«, la parolon de deputito Dro Zöphel pri esperanto en la saksa parlamento (du lastajn ĉapitrojn ni resumas en la rubriko »Kronika a komentář«) kaj la nomaron de 102 esperantistaj societoj

germanaj. En la teksto, verkita de Dro Schramm laŭ ĵurnalaj raportoj, estas 33 ilustraĵoj. Oni povas la libron rekomendi kiel belan rememoraĵon pri la kongreso kaj bonan propagandilon. — La membroj de »*B. Asocio E.*«, povas ĝin ricevi por duona prezo (50 pf.), se ili ĝin mendos (ĉe s-o Dro A. Schramm, Ständehaus, Dresden) citante nian revuon. *Bšk.*

Oficiala gazeto esperantista. Organo de la *Lingva komitato* kaj de la *Konstanta komitato de la kongresoj*. Red. & adm.: Paris, rue de Clichy 51, Francujo. Jara abonpago 2 Sm. — Tiu ĉi revuo en »Oficiala parto« publikigas komunikojn de Dro Zamenhof, Lingva kaj Kongresa komitatoj, en »Neoficiala parto« ĝi enhavas raportojn pri Centra oficejo, societoj kaj grupoj, konsuloj kaj Esperanto-oficejoj, registaraj kaj publikaj institucioj, gazetoj kaj literaturo k. s. Ĝi estas sekve informilo pri la stato kaj evolucio de nia movado. — En la 6-a n-o (I) estas komunikoj de la prezidanto de la Akademio pri la sendo de proponoj al la Akademio (ili estu senditaj al la sekretariejo, en nombro da 20 ekz. minimume, apartigitaj laŭ la enhavo kaj subskribitaj de 5 komitatanoj) kaj pri la komisio por la komuna vortaro, plue protokoloj de la (5) konsidoj de L. K. en Dresden, cirkulero pri la organizo de la kvina kaj sesa kongresoj (sed feliĉe efektiĝos tiujare sole la kvina!) kaj cirkulero al ĉiuj societoj kaj grupoj (petanta konfidesprimon de la societoj por L. K.). Laŭ »Ĝenerala statistiko de esp.« ekzistas (laŭ la stato en 5. XII. 08) 1170 propagandaj kaj 126 fakaj societoj, 299 konsulurboj, 76 gazetoj. *Bšk.*

Internacia scienca revuo, VI, 61: La Irigaciaj sistemoj de Usono (Ch. E. Randall), Deveno oceana de homo (prof. M. Finot), Virino kaj kreo de homoj (Avincena-Kluge), Dro Vallienne, Pri internacia helpmono, Pri alkoholismo. Mirindege estas, ke la redakcio de scienca revuo publikigis la artikolon »Kiu antaŭenigas alkoholismon?« Eble malagrabla preterrigardo?! *Bšk.*

Voĉo de kuracistoj (II, 2) en la artikolo »Pri esperantaj resumoj en naciaj medicinaj ĵurnaloj« proponas la manieron, kiel devigi naciajn revuojn kuracistajn, ke ili — kiel rusa »Ĥirurgio« (Moskva) — publikigadu esp. resumojn de siaj originalaj artikoloj. En la rubriko »Revuo scienca« estas 46 analizoj! La revuo havas 660 abonintojn; la redakcio esperas — kaj ni deziras tion al ĝi — ke baldaŭ ĝi havos pli ol 1000 abonintojn (Pri TEKA ni skribas en la rubriko »Kronika a komentář«). *Rd.*

Dia regno. Monata esperanta organo por *Kristanaj unuiĝoj de junaj viroj* (KUJV) Red. kaj adm.: Mülheim a. R., Friedrich-Wilhelmstr. 66 (P. Hübner), Germanujo. Jarabono 90 Sd. — Antaŭa revueto »Esperanto en la servo de la Dia regno« aperas sub la nova, pli taŭga titolo komencante sian II-an jarkolekton. — El la 1-a n-o oni ekscias, ke en 28 urboj ekzistas KUJV, en kiuj estas esperantistoj. *Rd.*

La Spritulo en la lasta n-o (I, 5) enhavas jenajn humoraĵojn, spritaĵojn kaj ilustraĵojn: Sonĝo de lernanto post la unua esp. leciono (li estas minacata de supersignitaj literoj), La vekiĝo de la s-o de la 22-a, La gramofono (komike pentranta hejmecan familian vivadon en Germanujo), El nia kunlaborantaro (diverslanda), Sur la batalkampo de Lingvoj internaciaj, Bismarkaj anekdotoj, En la silvestra nokto. *Hkh.*

Tra la filatelio, kiel ni vidas laŭ la 8-a n-o (la n-ojn 6, 7 ni ne ricevis), faris bonan reformon: ĝi estas nun redaktata sole en esperanto.

La gazeto fariĝis organo de *Universala asocio filatelia esperantista*, kies sidejo estas en Beziers (Francujo), en la oficejo de l' gazeto. *Bšk.*

Informaj raportoj eliras nun ĉiumonate (abonpago 1·25 Sm). En la lasta n-o (III, 1) estas komencita informanta skizo »La ŝtataj kaj socialaj organizoj en Aŭstrio«. En notizo »Vera esperantismo« J. L. skribas, ke ĉe aŭstriaj Germanoj la esperantismo kreskas »en vere la plej ideala formo, almenaŭ parte«, sed »ĉu krom Germanoj la aliaj nacioj de nia monarkio tiel pensas, tio estas grava demando«. Li riproĉas, ke tiuj nacioj uzas esperanton sole por diskonigi sian literaturon, ke okazas »tre bedaŭrindaj uzadoj«, publikigo de broŝuroj (Slovakoj kaj Magiaroj) kaj artikoloj (laste en »Esperanto«), kiuj atakas nacion, li deziras, ke »ni aŭstri-hungariaj esperantistoj forgesu la politikan disiĝon, ni laboru interkonsente por diskonigo de nia lingvo, kaj ne tuŝu la aferojn, kiuj grave povus malhelpi nian celon«, ke »ni ne politiku kaj polemiku per esperanto«. Li opinias, ke »kiu trouzas esperanton por semi la malpacon inter la popoloj, kiu ŝiras vundojn, anstataŭ fari ĉion, kio povas helpi sanigon, tiu ne estas esperantisto«. Videble la aŭtoro havas bonan intencon, li tuŝis gravan aferon, kiu meritas seriozan pritrakton, sed li eraras en kelkaj punktoj, kiel ni aliloke montros. *Rd.*

Pola esperantisto (IV, 1) rezonas pri la maniero, kiel doni firman financan fundamenton al »Centra oficejo« kaj proponas tri rimedojn: 1. konstantajn kotizaĵojn de esp. societoj, 2. kotizaĵojn bonvolajn sufiĉe grandajn, 3. pagojn por informoj de esp. konsuloj. *Bšk.*

Germana esperantisto (VI, 2). J. Borel (Tro multaj ĵurnaloj) montras, ke la esp. gazetaro, kreskas multe pli rapide ol la legantaro, kiu neproporcieco kaŭzas neeviteblajn malbonaĵojn: multaj gazetoj tre malfacile vivetas, multaj baldaŭ mortas pro manko da abonantoj, al la legantoj mankas tempo por legi, mono por aboni; li konsilas komenci publikigon de esp. gazeto sole, se oni posedas sufiĉajn monrimedojn kaj se oni estas pretaj oferi siajn tempon kaj penojn. K. Klein kolektis la eldirojn de Max Müller pri la ideo de artefarita lingvo el lia verko »Lectures on the Science of Langage«, kiujn ni ankaŭ konatigos al niaj legantoj. *Bšk.*

Rumana esperantisto (I, 4) raportas detale pri la II-a bulgara esp. kongreso (en Šumen la 26.-28. VII. 08), en kiu partoprenis ankaŭ rumana delegitaro. Sekvas raportoj pri Dresdena kongreso, pri asocioj de kuracistoj kaj instruistoj, pri esp. movado kaj kelkaj literaturaj artikoloj: La avino, Rumana popola rakonteto, Fabeleto, La ventego. *Rd.*

Brazila esperantisto. Oficiala organo de *»Brazila ligo esperantista«*. Red. & adm.: Rio de Janeiro, Largo de S. Francisco de Paula, 4, Sob. Brazilio. Jara abonpago 2·40 Sm. — Tiu ĉi monata gazeto anstataŭas »Brazilan revuon esperantistan«, kies daŭriganto ĝi volas esti programe. — El kvar unuaj n-oj ni citas artikolojn: Brazilujo, Lia Moŝto (impresoj el provinco). *Rd.*

Estlanda esperantisto. Oficiala organo de *Revela Esperantista grupo*. Red. & adm.: Revel, Foom-Kuninga uul. 20 (J. A. Rahamägi), Estlando. Abonprezo jare 1·10 Sm. La 6a n-o (I) de tiu ĉi modesta gazeto estas dediĉita por raportoj pri la kongreso, U. E. A., J. A. J. ktp. *Rd.*

La Holanda pioniro en »Ensendita fako« (I, 4, 7) plendas, ke »inter multaj bonaj propagandiloj oni vane serĉas malkaran katalogon de

ĉiuj verkoj, kiuj ekzistas en nia lingvo« kaj proponas eldonadi trimonate au duonjare liston da ĉiuj elirintaj verkoj, kiu estus bona informilo, reklamilo kaj propagandilo. Estas nenia dubo, ke la aŭtoro (M. J. Wessel) estas prava koncerne la bezonon de la plena (sufiĉus jara) katalogo. *Rd.*

Tutmonda espero (Kataluna esperantisto). Ĉiumonata revuo, organo de la kataluna esperantistaro. Red. & adm.: Barcelona, Paradís 12, Hispanujo. Jarabono 1·20 Sm. — La revuo redaktata de fervora samideano Dro J. Bremon i Masgrau aperas en esperanta kaj kataluna lingvoj enhavante krom kutimaj rubrikoj paĝojn el kataluna literaturo nesufiĉe konata alilande. Tiujara, dua, jarkolekto fariĝos kredeble serĉata pro aŭtentikaj sciigoj pri la nunjara kongreso. — En la 13a n-o estas detala nomaro da temoj por konkursoj en »Floraj ludoj« aranĝotaj dum la kongreso. *Bšk.*

Svisa espero. Oficiala organo de la *Svisa esperanta societo.* Redakcio kaj administracio: Genève, rue Bovy-Lysberg 8, Svisio. Jara abonpago 1·20 Sm. — Tiu ĉi monata revuo enhavas en ĉiu numero krom plena kroniko de esp. movado en Svisio kaj fremdlando literaturajn kaj ilustritajn artikolojn pri Svisio. La nova, jam sepa, jarkolekto aperas en pligrandigita formato kaj en la nova kolora (ni ne diras: arta) kovrilo. — En la unua n-o altiras la atenton artikolo »La festo de ,Escalade' en Ĝenevo« (kun ilustraĵoj). El »Kronikoj« ni elprenas: en Genève ekzistas 4 esp. grupoj; en Bern estas centra »Svisa esp. biblioteko« por la pruntedono de esp. libroj al ĉiuj esperantistoj svisiaj; en Lausanne fondiĝis grupo de liberpensuloj esperantistoj; la grupo en Neuchâtel havas 117 anojn. *Rd.*

Notizie esperantiste. Periodico mensile pubblicato a curra della *»Junula amikaro esperantista«* di Palermo. Red. & adm.: Palermo, Via S. Agostino 6 (Giovanni Castiglia), Italujo. — Kvarpaĝa, itale redaktata monata revuo informanta pri la progresoj de esperanto. — Eliris jam 2a n-o. *Rd.*

The Esperanto Instructor. A Monthly Journal for those who know, and for those who do not know, Esperanto. Red. & adm.: London W., 17 St. Stephen's Sq., Bayswater (J. C. O'Connor), Anglujo. Abonpago 1 Sm. — Tiu ĉi »gazeto« estas propre periode eliranta frazlibro kaj legolibro esp.-angla por tiuj, kiuj lernas tiujn lingvojn. En la 19a n-o (II) estas konversaciaj kaj komercaj frazoj, bicikla frazaro, amuzaj artikoloj k. s. *Rd.*

Ricevitaj eldonaĵoj (pri kiuj ni ne povis raporti supre). — *La Suno hispana* (V, 60). — *La Verda standardo* (IV, 3-4). Kun esp. gramatiko kaj vortaro. — *The Australian Esperantist* (I, 7, 8, 9). — *1. cirkulero pri la V-a internacia esperantista kongreso* (resumota en la rubriko »Kronika a komentář«). — *Lingua questioni* (represaĵo el »Germana ilisto«). Komparo de esp. kaj ilo. — *Listo di grupi e societi adherinta a la linguo di la Delegitaro. Listo di la jurnali.* Adresaro de 44 grupoj kaj 6 gazetoj ilistaj. — *Uniono di l'amiki di la linguo internaciona.* Provizoraj statutoj de ilista unuiĝo. — *Al chiuj esperantistoj: Oficialaj dokumentoj.* Cirkulero de s-oj Couturat kaj Leau. *Rd.*

Zodpovědný redaktor: Dr. Stan Kamaryt. — Nakladatel Ferd. Boháček, knihkupec. — Tisk »Politiky« v Praze.